

63-a jaro n-ro 176 2022:4

la lampiro

A man with grey hair and a beard, wearing a dark jacket and dark pants, stands in front of a large bronze statue of a bearded man. The statue is seated and holds a staff or scepter. It is mounted on a large, rectangular stone pedestal. The background shows a beach, the sea, and a blue sky with white clouds. The man has his hands raised in a gesture.

**Forpaso de
bonfara samideano**



Esperanta Kongreso de la Ŝtato San-Paŭlo

12 - 15 novembro 2022

<https://esperanto.org.br/kongreso>

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Plurmedia perilo
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**
Labori unuece
- 6 | **Kuriozaĵoj**
Paperaj pupoj
- 10 | **Ne plu inter ni**
Forpaso de bonfara samideano
- 13 | **Kino kaj aliaj artoj**
Camille Claudel
- 15 | **Iom da filozofio**
Apetito anstataŭ malsato:
amo sen pasio
- 17 | **Recenzo**
Mistera lumo
- 19 | **Iom da poezio**
Ferreira Gullar
- 20 | **Por via medito**
Senco de la vivo
- 24 | **Iom da gramatiko**
Uzo de SEN antaŭ infinitivo
- 28 | **Virtuala fenestro**
Virtuala Kongreso de Esperanto
de ILEI
- 31 | **Opiniangulo**
Manifesto

Kovrilbildo:

Marcos Zlotovich (Zlov) en Praia Grande (San-Paŭlo, Brazilo) kelkajn tagojn antaŭ sia morto.



63-ajaro n-ro 176 2022:4

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭantoj

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2022

Simple Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Scivolo pri aliulaj ideoj

Estas ĉiam plezuro por redaktanto, kiam kunlaborantoj reagis al lia peto pri kontribuoj al nova numero. Pri tio mi ne havas plendojn. Ni havas tiamon da konstantaj verkemuloj, kiuj garantias malbanalan enhavon kaj donas lumon al nia Lampiro. Ankaŭ en ĉi tiu numero vi povas trovi ilian donacon al ni. Dankegon al ili!

Mi pensas tamen, ke novaj talentuloj povus aldoniĝi al tiu grupeto. Kio mankas al ili por ekverki? Esperantistoĵi ne estas ordinaraj homoj, ili havas

proprajn ideojn, instigan manieron rigardi nian mondon, saĝajn vidpunktojn.

Kial ne kundividi tiajn vidpunktojn kun aliaj samideanoj? Jen tio estas por mi mistero. Eble kelkajn timigas la simpla ago verki? Eble iuj ne havas multe da disponebla tempo? Ankoraŭ eble ili ne estas konvinkitaj, ke ni scivolas pri iliaj ideoj?

Ekzemple, en ĉi tiu numero de nia revuo vi trovas pensigan artikolon de unu el niaj plej fekundaj kontribuantoj — Prof-o Paulo Nascentes. Lia temo estas “la senco de la vivo”. Leginte ĝin, oni nepre ricevas fortan stimulon pensi pri nia Esperantista vivo. Ĉu ankaŭ vi?

Mi tre ŝatus ekscii vian opinion pri ĝi. Kaj ne nur pri ĝi!

Paulo Sergio Viana



Reveno kun granda plezuro

Saluton, karaj samideanoj kaj legantoj!

Kun granda plezuro mi skribas al vi pri nia kongreso.

En ĉi tiu jaro ni okazigos nian kongreson, post du jaroj, pro la pandemio. Sed ni revenos kun granda plezuro.

Nian kongreson organizas tri institucioj: EASP, BEL kaj BEJK, en urbo konata kiel “brazila Kalifornio”, nome Ribeirão Preto, tre bela urbo, afabla, kun popolo mirinda, tre simpatia.

Ĝi estas urbo en la interno de Ŝtato San-Paŭlo, kiu havas multajn allogaĵojn por ĉies gustoj. En ĝi vi povos spekti tre bonan teatraĵon en Teatro Pedro la II-a. Se vi volas piediri, vi havas boskon por piedirado. Vin, diboĉulojn, la urbo ne forgesas, ĝi proponas al vi agrablajn drinkejetojn kun plurspeca muziko. Se vi volas bieron en boteloj aŭ bareloj, vi disponas pri pluraj bierejoj.

Al sportemuloj eblas biciklado, kiu trairas la urbon laŭ mirinda promenejo.

Por la kleriĝemaj, oni havas la bibliotekon Altino Arantes, kiu estis reformita. Tie vi povas legi bonan libron, trankvile. Antaŭ vesperiĝo vi povas iri al belvedero, de kie vi vidas spektaklan sunsubiron.

Bone, nun mi invitu vin al partopreno en nia kongreso. Mi iom parolis pri la urbo, sed la plej granda beleco estos via ĉeesto; sen vi ĝi ne havos belecon.

Venu fari ĉi tiun urbon pli bela!

Dankon al ĉiuj!

Esmeraldo Aparecido de Alencar

Paperaj pupoj

Antaŭ kelkaj tagoj, mi ricevis de amikino per interreto foton de paperaj pupoj. Probable multaj el vi neniam vidis ĉi tian ludilon aŭ eĉ aŭdis pri ĝi. Tamen, la sinjorinoj ĉirkaŭ 50- 60- 70-jaraĝaj, certe ludis per ili kaj ankaŭ la same aĝaj sinjoroj, kiuj havis fratinojn aŭ kuzinojn aŭ eĉ amikinojn. Ili estis inaj ludiloj, sed la knaboj ankaŭ rajtis sin amuziĝi per ili.

La ludilo nomiĝas Papera Pupo, sed ĝi povas esti bildo de persono, besto aŭ senviva objekto. Temas pri du-dimensia figuro, desegnita aŭ presita sur papero, kun vestaĵoj kaj akcesoraĵoj aparte. La figuroj, vestaĵoj kaj akcesoraĵoj devas esti eltranĉitaj kaj poste muntitaj unu sur la alia.

Paperaj pupoj ekzistas tiel longe kiel ekzistas papero kaj kreivaj homoj por apliki bildojn al ili. Ili estis uzataj en ritaj ceremonioj en aziaj kulturoj dum multaj jarcentoj. Unu el la plej



fruaj notoj estas pri antikva japana purig-ceremonio datumita de almenaŭ 900 p.K. En ĝi aperis figuro kaj faldita paperobjekto, simila al kimono, kiuj estis ĵetitaj eksterŝipen. Simila rito okazas ĝis hodiaŭ, en kiu la japanoj skribas siajn

problemojn sur pupo el ŝtofo aŭ papero kaj ĵetas ĝin en la riveron, por ke la fluo forportu ĝin kune kun iliaj problemoj.



Pupoj por *Nihon no Ningyo* – purigceremonio

En la okcidenta mondo, paperpupoj estis uzataj por reklamado, aperis en revuoj kaj gazetoj, kaj kovris gamon da temoj kaj tempoperiodoj. Tra la jaroj, ili estis uzataj por plifortigi kulturajn kredojn pri kiel aspektas idealaj virinoj.

Ekzempleroj de la unuaj veraj paperpupoj, similaj al tiuj, kiujn ni konas hodiaŭ, estis trovitaj en gravaj centroj kiel Vieno, Berlino, Londono kaj Parizo. Ili estis homaj figuroj kaj kostumoj mane pentritaj kaj kreitaj por la amuziĝo de riĉaj plenkreskuloj. Kelkaj kredas, ke ili estis faritaj de kudristino por montri realajn formojn, aŭ ili eble estis faritaj kiel socipolitikaj satiroj de popularaj figuroj de tiu tempo.



Paperpupoj, lignobriketa presaĵo kolorigita per akvarelo, ĉ. 1650, suda germana.

Malnova konata pupo estis farita el kartono. Presita ĉirkaŭ 1650 en suda Germanio, ĝi prezentis du virinfigurojn kun granda aro da roboj, ĉapeloj, hararanĝoj kaj aksesoraĵoj. Oni nomis ilin marionetoj uzataj por distri plenkreskan spektantaron.

En la 18-a jarcento, franca modo estis referenco en Eŭropo. En la tempo

de la Franca Revolucio (1789-1799), la "modelaj pupoj" (lignaj manekenoj ĉirkaŭ 1,20 m, portantaj la lastajn novaĵojn kaj senditaj al la aristokrataro) estis anstataŭigitaj per presaĵoj en gazetoj kiel reklamado de novaj modaj tendencoj, kaj anglaj kaj francaj.

En 1791, Londona reklamo anoncis novan inventon, nome "anglan pupon". Ĝi estis figuro de juna virino, 20 centimetrojn alta, kun aro da subvestoj, harakcesoraĵoj, ses kompletaj

kostumoj kaj estis vendita por kelkaj cendoj. Pupoj similaj al ĉi tiu ankaŭ estis venditaj en Germanio. Ili estis prezentitaj kiel ludilo por knabinoj, sed tiel artaj kaj subtilaj, ke ankaŭ patrinoj,

same kiel servistinoj, ludis per ili. Germanaj imitaĵoj aperis senprokraste. La "angla pupo", aliĝinta al revuoj, presaĵoj, novaj reklamoj en gazetoj, kaj kapabla penetri ĉiujn sociajn kategoriojn, celas stimuli daŭran kaj regulan konsumadon. Ĝi povis samtempe servi kiel ludilo, kontribuante al la kondiĉado de estonta generacio de konsumantoj.



La unua amasproduktita pupo estis nomita "Little Fanny", fare de S&J Fuller en Londono en 1810, tamen nur komence de la 20-a jarcento la paperpupoj ekestis produktitaj grand-skale por la plej popularaj klasoj de la socio.

La unua papera pupo portretanta faman personon estis tiu de la baletistino Marie Taglioni, en la 1830-aj jaroj.

Ĉi tie en Brazilo ili alvenis multe poste, verŝajne en la 1930-aj jaroj, el Parizo, kaj estis venditaj en ludil-butikoj.

En la 1900-aj jaroj, la paperaj pupoj abundis en multaj sektoroj kiuj celis

virinojn kaj infanojn, kiel ekzemple virinaj kaj infanrevuoj. Ili ankaŭ komencis aperi en la virinaj kaj infanaj sekcioj de pluraj gazetoj kaj aliaj publikaĵoj. Multaj artistoj dediĉis sin dum jaroj al kreado kaj publikigo de pupoj. La ora epoko de paperaj pupoj okazis inter la 1930-aj kaj 1950-aj jaroj, kiam ilia populareco atingis nivelojn neniam superitajn. Eĉ dum la Dua Mondmilito ili daŭre estis produktitaj malgraŭ la malabundeco de papero. Dum tiu periodo, famuloj kiuj estis tre popularaj en la kinoarta mondo fariĝis temo de paperaj pupoj.

Betty Bonnet estis paperpupo populara en la fruaj 1900-aj jaroj,



kreita de Sheila Young por *The Ladies' Home Journal* de 1915 ĝis 1918. Tiu paĝo, de 1917, havas la geavojn de Betty Bonnet.

Paperpupoj malkreskis en popular-eco en la 1960-aj jaroj kaj 1970-aj jaroj, kaj kelkaj kulpigas la pupon Barbie, fabrikitan de Mattel. Kun sia moda vestaro, Barbie plenumis multon de la sama fantazia rolo kiel paperaj pupoj. La glora tempo de paperaj pupoj daŭris pli ol cent jarojn. En Brazilo, tiu okazis iom pli malfrue. Antaŭ ol Barbie, fabriko Estrela lanĉis similan pupon Susi en 1966, kiu certe plenumis la saman rolon, tamen plurajn jarojn poste.

Nuntempe ekzistas paperaj pupoj en cifereca formato.



Paperpupo kaj vestaroj – 1950



Revuo de 1919 – ilustraĵo de aktorino Norma Talmadge kaj kelkaj el ŝiaj kinematografiaj kostumoj

Johann Ludwig Stahl, La "Angla Pupo", 1794. Urba Muzeo de Nurenbergo



Verkis:
Maria Antonia Sobral

Forpasis bonfara samideano

*La 21-an de aŭgusto 2022 forpasis la esperantisto **Marcos Zlotovich** per sinmortigo je la aĝo de 61 jaroj. En la okazo li loĝis en la urbo Praia Grande, San-Paŭlo, kune kun sia edzino. Li membriĝis al EASP en 1986 kaj fariĝis konstanta partoprenanto en la agadoj de la asocio kaj ankaŭ unu el ties grandaj subtenantoj. La suban tekston pri lia esperantisteco ni trovis en Vikipedio(*) kaj reproduktas ĝin ĉi tie kiel memorigon.*

Marcos Zlón ZLOTOVICH (1961 – Bonaero, Argentino), aŭ, pli simple, Zlón aŭ Islove, kiel li estas plej konata, estas judpoldevena brazila esperantisto el San-Paŭlo (SP) kaj diplomita de USP (Universitato de San-Paŭlo, lia *alma mater*) socia sciencisto (t.e., profesie, sociologo), plej konata kiel la disvastiganto, aktivulo kaj instruisto de Esperanto, kiu instruis la internacian lingvon al miloj da homoj en pluraj urboj, ĉefe en universitatoj dum jardekoj en sennombraj ĉeestaj kursoj, estante el la homoj, kiuj plej havis ĉeestajn lernantojn de Esperanto — en sia lando kaj en la tuta mondo.

Li ankaŭ estas organizanto de kursoj, esperantaj eventoj ktp, verkinto de kelkaj instru-materialoj, esperantaj



Marcos Zlotovich (1961 – 2022) en la urbo Praia Grande (San-Paŭlo – Brazilo) kelkajn tagojn antaŭ sia morto.

artikoloj kaj eĉ de kelkaj libroj, plejparte atendantaj la publikigon, krome preleganto en kaj pri Esperanto kaj konstanta aktivulo de la Esperantomovado kaj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP) ekde la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento. Li ankaŭ estas tradukanto kaj en samtempaj tradukadoj, ekz-e, ĉe USP, en prezentoj de Geraldo Mattos, tiama prezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj en prelegaroj de la germana Prof-ro D-ro Helmar Gunter Frank, el AIS kaj Universitato de Paderborn (pri Kibernetika Pedagogio, estante li konsiderata la "monda patro" de tiu fako), organizataj kune kun Prof-ro D-ro Osvaldo Sangiorgi, nacikonata kiel enkondukinto en Brazilon de la moderna matematiko kaj fondinto, en USP, de la grupo de Kibernetika Pedagogio, kiu enkondukis kaj favoris Zlów (kaj ankaŭ la lingvon ĉe li) en la instruadon de la internacia lingvo en sia universitato kaj en pluraj fakultatoj. Zlów, kune kun li kaj lia amiko kaj profesoro de tiu Universitato, la nacia deputito Freitas Nobre (kiu estis la prezidanto de la brazila Parlamento dum la UK en Braziljo en 1980), ekfondis, sub instigo de tiu lasta, la universitatan Esperanto-grupon "Esperant'USP" kaj estis ties unua prezidanto. Zlów, instruante Esperanton, ĉiam uzis muzikon,

teatran skeĉon kaj humuron en ĉiuj lecionoj kaj fervore defendas la integriĝon de la lernantoj en la E-komunumon kaj movadon ekde la unua leciono precipe pere de la interreto.

Zlów estas denaska vegetarano (neniam provis viandon) kaj ne estas kaj neniam estis ligita al iu ajn eklezio, sekto aŭ politika partio, sed konsideras sin fervora kristano. Li ĵuris vivi laŭ la principoj de vereco, modesteco kaj ne-perforto, t.e., neniam preterlasi la veron aŭ konduki iun en eraron aŭ vundi iun ajn, ĉu fizike, psike, pervorte, morale, misfamige, diboĉe, moke, malhelpe, malkuraĝige ktp.

Li estas preskaŭ denaskulo (t.e., denaska esperantisto), ĉar lia patrino, el kiu li lernis la unuajn vortojn kaj esprimojn en la internacia lingvo kaj heredis la respekton kaj la amon pri Esperanto en la infanaĝo, jam estis esperantistino ekde la 40-aj jaroj, pro influo de la hungaro Laszlo Zinner, unu el la antaŭaj "motoroj" de tiu Esperanto-asocio, al kiu ŝi fariĝis koramikino. Sed, fakte, Zlów nur lernis la lingvon en EASP, kie li diplomiĝis en la pedagogia kurso, sub la gvido de Elvira Fontes, kiun li konsideras sian "patrinon" en Esperantujo kaj modelon de esperantisteco. La unuan fojon,



Maldekstre de la busto de Zamenhof:
la hungara skulptisto Laszlo Zinner (1908-1977)
kaj antaŭ la statuo: la brazila instruistino
Elvira Fontes (1916-2007), ambaŭ tre gravaj figuroj
en la vivo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP)
kaj ankaŭ en la vivo de la forpasinto.

ke Zlów foriris el Brazilo estis por partopreni la estas Duan TAKE-n (Tut-Amerika Kongreso de Esperanto), okazinta en 1980, en San Luis, Argentino, lando de lia naskiĝo, ĉar Zlów vivis en Brazilo ekde sia unua vivjaro. Li estas "Dumviva Membro" kaj de UEA (al kiu li servis kiel faka delegito pri antropologio dum pluraj jaroj) kaj ankaŭ de BEL (Brazila Esperanto-Ligo). El tiu lasta li ricevis pokalon de "plej elstara kunlaboranto" (en la jaro 2002), pro la disvastigado de Esperanto kaj de la Ligo, kun pozitiva rezulto de centoj da aliĝoj (kaj realiĝoj) pere de lia persona volontula kunlaboro kaj strebo.

Zlów ankaŭ iniciatis Eo-grupojn kaj periodaĵojn kaj multe elspezis help-

ante finance kaj subtenante, diskrete, plurajn esperantajn iniciatojn, projektojn kaj eventojn. Li ankaŭ estis gastiganto de Pasporta Servo de TEJO. Li partoprenis multajn E-kongresojn naciajn kaj internaciajn kaj dufoje estis direktoro de sia Asocio (EASP) kaj estis ties vic-prezidanto. Li estas membro de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kaj eks-prezidanto ("sekciestro") de ties (tutlanda) Brazila Sekcio (al kiu li estis nomumita de la fama akademiano, de AdE kaj de AIS, kaj prezidanto de la monda ILEI, la itala Prof-ro D-ro Maŭro La Torre), kiun li estris de 2002 ĝis 2005. Tiam Zlów elpensis kaj lanĉis la revueton Brasilei, kaj publikigis ĝian unuan numeron.

(*) Fonto de la supra teksto:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Marcos_Zl%C3%B3v_Zlotovich



Vizito al la busto de Zamenhof fare de Marcos Zlów

Camille Claudel

La mondo gastigas kelkajn artistojn. Kaj tiu ĉi serio temas pri kelkaj artistinoj, ĉar tiuj estas specialaj – ĉefe en mondo kie viroj regas ĉie. Ĉi-foje mi decidis iom paroli al vi pri Camille Claudel. Ŝi estis franca elstara skulptisto, kies vivo kaj verko estas inspirveka. Samtempe tamen kun tre malĝoja fono.

Camille naskiĝis en norda franca urbo Fère-en-Tardenois je la oka de decembro 1864. Ŝi estis la plej aĝa el la tri gefiloj de Louis Prosper Claudel kaj Louise-Athanaïse. La familio loĝis dum iom da tempo en urbo, sed tuj ili translokiĝis al la proksima urbo Villeneuve-Sur-Fère.

Ekde sia adoleskaĝo, Camille interesiĝis pri skulptado kaj arto. Ŝia patro multe apogis ŝin, male ol ŝia patrino, kiu entute ne aprobis ŝian inklinon. Kun iom da persisto, fine ŝi translokiĝis al Parizo, urbo en kiu ŝi eĉ kreis propran atelieron. Tie ŝi daŭrigis sian laboron sub la gvido de Alfred Boucher, kiu multe laŭdis ŝian laboron.



Camille Claudel (1864 – 1943)

Tiam la okazoj venigis Rodin – jam fama franca artisto – al la vivo de Camille. Ambaŭ forte influis unu la alian kaj multe kunlaboris en kelkaj skulptaĵoj. La admiro iĝis amrilato, sed Rodin estis edziĝinta jam de jaroj. Tiam li neadis al Camille eventualan oficialigon de ilia rilato, ĝis ili finfine rompis ĝin.

La neado de Rodin kaj abortoj tre malbone influis la psikon de Camille. Dum kelkaj jaroj poste ŝi ade laboris, kaj klopodis krei sian propran manieron artumi kaj distingi sin de Rodin, kiun ŝi nomis riproĉe “La mustelo”.

Fine, ŝia psika stato multe malpliboniĝis, ĉefe post forpaso de ŝia patro.

La familio decidis tiam ŝin enhospitaligi, kaj Camille forpasis jarojn poste pro manko de bona nutraĵo kaj vivkondiĉoj.

Ŝia verkaro poste iĝis fama kaj mondvaste rekonata, inklude de tiuj, kiujn ŝi faris kun Rodin, kvankam ŝia familio ne faris ion ajn por postvivigi ŝiajn mirindajn kaj intensajn skulptaĵojn. Tio estis danke al kelkaj personoj, kiuj atentis pri ŝi, kaj ĉefe post produktado de filmoj kaj dokumentarioj pri ŝia vivo.

Interesa punkto pri ŝia verkaro estas ke ĝi defias la seksisman morallon de la arta mondo de tiu epoko, per skulptado de nudaĵoj kun sama libereco de la viroj.

Mi persone multe ŝatas el ŝiaj verkoj: “Sakountala aŭ Vertume et Pomone”, “La Vague” (esperante “la ondo”), “La valse” (“la Valso” en esperanto) kaj “Chloto”. Sed ĉio kion ŝi faris estas ja impresiga, kaj doloras min imagi ke tia persono estis devigita tiom suferi dum la vivo.

Mi esperas ke vi ĝuis legi tiun ĉi artikolon kaj scivolemigis vin pri tiu ĉi mirinda artistino kiu estis Camille Claudel. Mi rekomendas vin esplori pli pri ŝiaj verkoj. Ĝis la sekva fojo!

Anna Lobo de Carvalho



Vertumno kaj Pomono (1905)



La Valse (1905)



Camille en sia ateliero

Apetito anstataŭ malsato: amo sen pasio

En sia unua grado, estante ankoraŭ pasio, erosa, la amo estas esence deziro al tio, kio mankas. En tiu stato, la amanto riskas ne plu ami pro satiĝo aŭ seniluziiĝo.

En pli alta ŝtupo, amo naskiĝas kaj disvolviĝas eĉ se ne estas manko. En tiu stadio ankoraŭ regas deziro, sed ĝi ne estas deziro al io ne posedata. La objekto de deziro ĉeestas, la amanto ne suferas pro ĝia foresto.

Por nomi tiaspecan amon, distingan disde la pasio, disde eroso, la antikvaj grekoj uzis la vorton philia. Foje oni tradukas ĝin per “amikeco”, tamen philia estas pli vastsenca al amikeco, ĉar ĝi aplikeblas ne nur al interrilatoj kun amikoj. Estas philia, ekzemple, la amo inter fratoj, patroj kaj filoj. Ĉar ne ekzistas

ununura termino por signi ĝin, ni uzu la esprimojn “perfekta amikeco” aŭ “ideala amikeco”.

Kompari malsaton kun appetito estas maniero komprenigi la diferen-



con inter eroso kaj philia. Malgraŭ ke tiu ekzemplo povas ŝajni maldelikata, ĝi taŭgas, ĉar la deziro, kune kun la neceso, regas la rilaton inter homo kaj manĝaĵo.

Malsatulo deziras manĝi. Se manĝaĵo mankas, li suferas, ĝis li povas satiĝi. Se ne mankas manĝaĵo, antaŭ ĝi li sentas deziron, sed sen sufero. Malsato estas manko de manĝaĵo, appetito estas potenco manĝi.

La patro amas sian filon, kiu ne mankas al li. Eĉ se pasintecce li volis havi filon, tio estis prefere revo, ol

sento pri manko. La revata filo iĝis reala kaj nun la patro amas lin, same kiel la amikoj amas unu la aliajn, en ilia ne-manko.

Rimarkinda distingo estas pri nombro da amatoj, en komparo de eroso kun philia. Ne eblas samtempe ami pasie pli ol unu, la pasio estas ekskluziviga. Philia ne, ĝi permesas plurecon, kvankam ankoraŭ limigitan. Patro kapablas ami ĉiujn siajn filojn, proprajn aŭ adoptitajn, sed ne tiujn de aliuloj. Eblas havi multajn amikojn, sed ne esti amiko de ĉiuj, eĉ ne de la plimulto.

Kompreneble ekzistas sufero en philia. Ĉiu, kiu amas, scias tion. Doloro de amiko suferigas amikon, ekstreme suferas patrino se ŝia filo malsanas. Jen do ŝajna simileco tamen grava diferenco inter eroso kaj philia: tiu, kiu

amas pasie, suferas pro sia propra doloro, ne pro la doloro de la amato.

Ankaŭ la manko ordinare estas kaŭzo de sufero en philia. La diferenco estas, ke en ĝi la amanto ne amas tion, kio mankas al li, sed, ke tio, kion li amas, kelkfoje mankas.

Tiuj komparoj ne estu rigardataj kiel kondamno de la pasio. Ne necesas elekti inter eroso kaj philia, aŭ eble pli bone estas diri, ke ne eblas fari tiun elekton. Fakte la plimulto spertas ambaŭ dum la vivo.

Gravas kompreni, ke pasio estas stato, io tute ne – aŭ tre malfacile – regebla, dum la amo nomata philia estas faro. Ĝi naskiĝas spontane, kiam filo ankoraŭ estas en la ventro de patrino, kiam avo unuafoje rigardas sian nepon, kiam kolegoj malkovras, ke unu povas fidi la alian... Sed poste la amanto povas volonte kreskigi ĝin, por sia propra bono kaj por la bono de la amato.

**José Mauro
Progiante**



Mistera lumo

TITOLO: MISTERA LUMO


AŬTORO: JULIAN MODEST

ELDONO: HUNGARA E-ASOCIO, 1987.

Eble oni povus supozi, ke verkado de noveloj estas simpla tasko. Kompreneble, ĝi povas esti simpla tasko, se oni intencas nur rakonti ion banalan, en banala formo. La samo validas por iu ajn artaĵo: ĉiam eblas produkti ion banalan kaj nomi ĝin artaĵo.

Alia afero estas produkti vere artan novelon, kiu en malmulte da paĝoj (foje nur du) enhavas ian interesan enhavon, ian provokan etoson, ian psikologian intrigon, ian fluan ritmon kaj fine ian trafan konkludon. Vera defio!

Oni kutimas aserti, ke vere gravaj fikciaj literaturaĵoj estas romanoj. Dubinde. En romano, la aŭtoro disponas pri senlima tempo kaj paĝokvanto por konstrui sian longan rakonton. Iusence, li ricevas multe pli da spaco por tio. En noveloj li preskaŭ ne povas spiri. Postulataj estas ĝustaj frazoj,



precizaj sinsekvoj de faktoj kaj ideoj, ŝparemo pri detaloj, sen tamen perdo de la elano. Se leganto volas scii, ĉu novelo estis sukcese verkita, sufiĉas, ke li atentu pri siaj propraj pensoj post la fina punkto. Se la rakonto pensigas vin, se ĝi tiklas vin, se ĝi provokas vian cerbon, se ĝi restas en via menso dum certa tempo, tiam ĝi trafis sian artan intencon.

Julian Modest estas eminenta novelisto. Ĉi tiu volumeto tion montras, ĉar ĉiuj 19 ekzempleroj estas sukcesaj. Li estas tre kurioza aŭtoro, ĉar per simpla stilo, tamen flua kaj harmonia, li atingas ĉiam belan rakontan ritmon; per simplaj temoj, ĝenerale el la ĉiutaga vivo de ordinaraj homfiguroj, li sukcesas tiri ian originalan, surprizan flankon; per konkludoj ĝenerale nespektaklaj, sed sobraj kaj veraspektaj, li lasas en la menson de la leganto sugestojn, ofte ne klare esprimatajn, sed ĉiam pensinstigajn. Li ne elektas ŝokajn scenojn, sed delikatajn travivaĵojn de homoj, inter kiuj povus esti la leganto mem. Li uzas nek frazojn komplikajn, nek vortkunmetojn enigmajn, sed lia pensofluo kondukas la leganton ĉiam al neatendita situacio. Finiĝas la rakonto, kaj la leganto sentas, ke li mem devas kompletigi la historion per siaj propraj pensoj. Li verkas simple, sed absolute malbanale. Kaj liaj rakontoj ne proponas pretajn konkludojn, sed ofte montriĝas malfermaj al diversaj interpretoj. Ili instigas la leganton pensi pri la rakontita situacio.

Mi citu fragmenton de la novelo “La vojo”, kiel ekzemplon:

“Vintre mi enlitiĝas pli frue kaj ordinare mi dormas trankvile, sed jam kelkajn noktojn mi sonĝas vojon. Longan, larĝan, blankan vojon, kiu venas de ie kaj gvidas al ie. Mi ne memoras, ĉu iam en la realo mi vidis similan vojon, sed en miaj sonĝoj, mi klare vidas tiun ĉi longan senfinan vojon.

Ĝi pasas tra valoj kaj kamparoj, malsupreniĝas en profundajn kanjonojn, zigzage rampas sur krutaj montaroj, kurbiras tra densaj arbaroj, serpentumas ĉirkaŭ ovalaj montetoj aŭ etendas sin kiel larĝa akvoplana riverego. Blanka makadamo kovras la vojon kaj nokte ĝi lumas kiel fosforo.”


Ĉu vi povus diveni, kien kondukos tiu simpla priskribo pri vojo? Jen la talento de vera rakontisto.

Modest verkis jam amason da libroj, inter noveloj kaj romanoj. Li estas sperta, rafinita verkisto. Tra liaj historioj oni povas senti, ke li estas ankaŭ humanisto, kiu farus la mondon pli bona, se li povus. Laŭ mia opinio, li bele kontribuas al tio.

Paulo S. Viana

Ferreira Gullar

Ferreira Gullar (kaŝnomo de José Ribamar Ferreira), naskiĝis en la ŝtato Maranhão, en Brazilo, en 1930. Verkisto, poeto, arto-kritikisto, tradukisto, eseisto, li kunfondis movadon por nov-konkretismo en poezio. Li estis membro de la Brazila Akademio de Beletro. Li mortis en 2016.



Ne estas vakoj

Ferreira Gullar

La prezo de fazeolo
ne enteniĝas en poemo. La prezo
de rizo
ne enteniĝas en poemo.
Ne enteniĝas en poemo la gaso
la elektro la telefono
la impost-evito
super lakto
super viando
super sukero
super pano.

Ŝtatoficisto
ne enteniĝas en poemo
kun sia malsatiga salajro
sia vivo enfermita
en arkivejoj.

Same ne enteniĝas en poemo
la laboristo
kiu erodas sian tagon ŝtalan
kaj karban
en mallumaj laborejoj

— ĉar la poemo, gesinjoroj,
estas fermita:
“ne estas vakoj”

Enteniĝas en poemo sole nur
homo senstomaka
virino el nuboj
senpreza frukto

Poemo, gesinjoroj,
nek bonodoras
nek odoraĉas

(Esperantigis **Paulo S. Viana**)

Senco de la Vivo

Enkonduko

Post la alveno de la tiel nomata mez-aĝo kaj emeriteco kiel profesoro de Beletra Instituto de UnB, mi decidis min reinventi. Novajn vivovojojn mi esploris, iĝis terapiisto kaj ‘master’ mentoro. Ĉe Skolo DEP – Energia Dinamiko de Psiĥismo, mi instruas. Post-gradiginte pri Analiza Psikologio, nun mi studas Artoterapion laŭ Jung. Same mi kursis pri master-mentorado laŭ ISOR-Sistemo (Instituto Holos). Certe, dum tiuj tempoj de komplekseco, plej bone estas nin reinventi. Jen la invito, kiun mi lasas al vi. Ĉu vi volas vin reinventi? Ek, do!



Mez-aĝa krizo

Kiu aŭ kio en mi scivolas pri senco de Vivo, se ajna senco ekzistas? Certe la homa egoo, tiu pova estro de la konscia menso, avida pri kontrolo. Vivo en si mem – malplena Spaco, sentempa Pleneco, natura Saĝeco,

Fonto de ĉio ajn – estas ja pura ĝuado, porĉiama volupto, graco, favor-dono, senpageco. Ĝi estas la viviga lumo de Suno, oceano, akvofaloj, verdaj floraj kampoj, matena zefiro kisanta fruktojn kaj florojn, steloj kun ties brilego. Kial menciigi plu? Ĉu sencas demandi, ĉu tiu demando sencas? Certe plej bone, plej saĝe estas danki la Vivon pro tio, kion jam ĝi al ni donas rilate al vivteno, beleco, gastemo dum nia persona vivo. Kiel ĉeloj de tiu mirinda Planedo, ni estas filoj de Geo. Tiel, el ĝiaj senfinaj energioj ni nin nutras. Ekzemple, ni estas aliigataj de fajro, pacigataj de akvo, ĉirkaŭataj de aero, nutrataj de tero. Ĉu tio ne estas mirindaĵo?

Malgraŭ tio, la popola saĝeco insistas pri la tiel nomata mez-aĝa krizo kaj maljunecaj malsanoj. La psiĥiatro, psikologo Karl Jung, mentoro de Analiza Psikologio, havas multon por kontribui. Tio interesas al

vi, leganto, al mi, al ni ĉiuj. Maljuniĝos ni ĉiuj. Almenaŭ tiuj, kiuj ne frue mortos. Jen la natura vojo. Indas memorigi tion, ke mez-aĝo kaj maljuno estas vivetapoj por vivi laŭeble plej bone. Kiel diras amiko, jam temp' estas

praktiki la arton mallerni. Jam temp' estas forliberiĝi el pluraj trompiĝoj lernejoj, familiaj, etnaj, kulturaj. Pluraj valoroj, bazitaj sur la logiko de konkuro, patriarkismo, devenas de sociaj organizformoj el la 19-a kaj 20-a jarcentoj. Male, valoroj kiaj solidareco, kooperado, pacema kunvivado iĝas motivo de moko. Superregas la deziro sukcesi ajnakoste.

Jung priskribas tiun konscio-ampleksigon kiel mensoŝanĝon. Sed, kio estas tio?

La Brazilia Vortaro “Michaelis” de la Portugala Lingvo tiel difinas “metanoio-n”. Ĝi devenas el la greka *metánoia*. Temas pri tri-senca substantivo: **1.** Esenca aliigo de penso aŭ karaktero. **2.** Por ext. Spirituala aliigoformado. **3.** Penso aŭ konscienc-riproĉo pro farita eraro; peko-puno.

Aliigo ja, sed kiusence? Jung asertas, pri tiu vivofazo, kiu ne nepre okazas meze de la ekzisto, sed iam ajn, ke “ne plu temas pri elturniĝi el ĉiuj

obstakloj al la plenumado de profesio, al la geedziĝo aŭ fari ajnan aferon, kiu signifas ekspansion de la vivo. Ni estas antaŭ la problemo trovi la sencon, kiu ebligas la daŭron de la vivo.” (7/1, par. 113).



Estas du esencaj aspektoj en tiu tekstero. Unue, la psiĥa energio, antaŭe eksteren direktita, al la monda ekspansio, nun turniĝas al la centro de la individuo, al serĉado de Si mem (*Self*). Pri tio ni parolos poste. Due, tiu introvertita vojo permesos trovi sencojn, kiuj devonu ne nur de la egoo, sed kiuj atentigas pri la Tuteco, kiu ni estas. Tiel, la estulo kiu vere ni estas povas ekvidi sencon ne plu nur util-celisman, pragmatisman, turniĝintan al la socia “*persono*”, al la roloj, kiujn ĝis nun ni rolis, sed kiuj ne plu utilas. Nun, la momento estas por redoni al la socio, servoforme, tion, kion ni lernadis. Sen fali, tamen, en aliigon al fiksitaj solvoj, funkciaj pasintoj, sed ne plu nun.

Refoje legindas Jung. Fama estas lia komparo de vivo al ĉiela Sunkurso:

“Nia vivo kompariĝas al la sunkurso. Matene, suno akiras ĉiam pli kaj pli da forto, ĝis atingi la brilon kaj la varmon de la zenito. Poste venas “enantjodromio”. Ĝia konstanta antaŭeniro ne

plu signifas kreskon, sed malkreskon de forto. [...] Estas grandege trompa la supozo, ke la senco de vivo elĉerpiĝis post la juneca fazo de ekspansio [...]. La vesperiĝo de la homa vivo estas tiom signifoplena kiom la matena periodo” (Jung, 7/2, § 114).

Tiamaniere, revenas espero. Nenio estas perdita por mez-aĝuloj. Sed, kion signifas *enantjodromio*? Vikipedio nin informas:

“**Enantjodromio** estas termino kreita de la filozofo Heraklito por la koncepto, ke granda forto en unu direkto naskas forton en la kontraŭa direkto. Ĝi estis aliformita de la psikologo Karl Jung por esti aplikata al la nekonscio, kiam ĝi konfliktas kun la deziroj de la konscia menso. Plato ankaŭ defendas la saman principon en sia verko “*Phaedo*” per aliaj vortoj: “Ĉio aperas tiumaniere, kontraŭojn kreas kontraŭoj”. (Jung, 7/1, § 11).

Daŭrigas Jung: “Heraklito (...) malkovris la plej neimageblan el ĉiuj leĝoj de Psikologio: *la reguligan funkcion de la kontraŭoj*. Tion li nomis *enantjodromio* (tio estas, kontraŭdirekten kuri) kaj avertis, ke iam ĉio revenas al sia kontraŭo”.

La direktoŝanĝo de la psiĥa energio, unue eksteren turniĝinta, al la ekspansio en la mondo, nun turniĝas internen, al la serĉado de Si mem. Ĉe

ni aperas kontraŭdirekta forto: de la ekspansio al la kvieteco. La individuiga proceso daŭras. Danke al tio ni iĝas singulareco, la sola individuo, senripeta, kiu vere ni estas. Tiu vojo nin enkondukas serve al la planoj de nia animo. Tio estas la malo de indviduismo egoismo, tipa de loĝantoj de grandaj metropoloj, kiuj vivas timigitaj de perforto, necerteco, manko de perspektivoj. Serĉe de Si, de *Memo*, tio estas, de *imago Dei* – la imago de Dio en ni, kiu povas ne koincidi kun tiuj, kiujn la kulturoj kaj stabilaj religioj volas trudi. Multfoje ili nin timigas per teruraj punoj, kiuj nin impresas ekde infanaĝo. La ŝanĝo de mondvizio ne okazas pro timo. Ĝi venas el la kontakto kun nekondiĉa amo, tio estas, tiu amo, kiu nin alproksimigas al io sakrala. Tio povas esti momento por renkonto kun arto, diverseco de kulturoj kaj idiomoj, kiu nin voku al pripenso kaj movo direkten al tio, kion ni ankoraŭ havas energion por manifesti ĉu en la arta ĉu en kultura kampo. Ni estas alvokitaj vivi kun pleneco. Alivorte, plene turniĝi al Vivo estas la plej bona preparo al morto, kiu povu signifi plenumon de nekonscio kaj respektivaj senfinaj eblecoj. Tiu vivofazo estas por la senigo de tio, kio estas ŝanĝebla kaj nedaŭra al tio, kio ĉe ni estas Neŝanĝebla kaj Eterna.

Ebloj de memkonado kaj memtransformado

La unua sciota afero estas, ke ĉio estas en ordo tia kia ĝi estas. Tio gravas por ke ni ne aldonu plian konflikton al tiel nomata krizo! Ĉio iras glate.

Sufero devenas el supozata devigo nepre ŝanĝi al ideala funkciado. Nu, “ideala funkciado” estas fikcio! Tio povas validi por maŝinoj. Ni tamen estas multe pli ol tio! Plej bone estas radikala memakceptado. Cetere, ni estas Plena Vivo, en ni. Natura Saĝeco ni ĉiuj estas, sen escepto. Ajnamaniere, sin dediĉi al terapia proceso povas plibonigi onian memkonon, sciigi nin kiam kaj kiel agi, kiam sindeteni. Eblas ankaŭ partopreni specifan mentoranon por solvi konfliktojn. Bona mentoro helpas vin tiucele. Ambaŭ-okaze, grandaj avantaĝoj povos okazi rilate al tio, kion vi taksas kiel problemon.

Nu, al kio utilas terapia proceso? Kio pri mentorado? Ambaŭ estas rimedoj por ampleksigi onian mondovizion. Tio, per si mem, permesas forliberiĝi de pluraj konfliktoj! La unua igas konscia nekonscian enhavon, ekzemple, *kompleksojn*, kiuj insistas nin “trapasi”, kiuj nin surprizigas per agoj kaj sintenoj, laŭ kiuj ni eĉ ne nin

rekonas. Tamen, pro la konscio pri tiu psiĥa enhavo, per sonĝo-analizo, ekzemple, tio ne plu nin turmentas kaj ni ĉesas ripeti nocajn ŝablonojn. Do, ili estas ŝanĝataj de aliaj pli sanaj. Mentorado ankaŭ ampleksigas nian mondovizion. Ekzemple, io ŝanĝiĝas, kiam vi komprenas, ke estas neŭtile regi situaciojn ekster vi. Tiel vi ĉesas suferi kaj liberiĝas. “Metanoio” estas liberiĝo. Tio kio ŝajne okazas ekster ni estas ja projekcio de nia menso. Konflikto nur ekzistas mense, en la *psiĥo*. Tamen, ĝi influas emociojn, sentojn, pensojn kaj agojn. Se mi pri-traktas tion ĉe mi, ĝi povos disfumiĝi en la aeron, simile al sapoveziko. Fine, mi centriĝas en Plena Vivo, sed ne plu en historiaj cirkonstancoj de la kondiĉita menso. Nu, tio faras diferencon aŭ ne? Jes, tio faras ĉiun diferencon!

Konkludo: la bona novaĵo

Fine, la bona novaĵo estas, ke tiuj kondiĉoj kreitaj en la kondiĉita menso povas havi siajn nocajn efikojn neŭtraligitaj de la ampleksiga mondovizio. Problemoj estas solvitaj sekure, kiam ni plivastigas nian percepton pri okazintaĵoj kaj nian mondovizion. Minimume, tio estas alloga aventuro! Ĉu ni malvualigu la esencan kaj perfektan estulon, kiu ni estas? Pli ol

(Daŭrigota sur paĝo 27)

Lingva Respondo de Francisco Wechsler

Demando

Multaj aŭtoroj nuntempe uzas sen antaŭ infinitivo: *sen paroli, sen manĝi, sen kompreni*. Se tiu uzo estas permesata, ĉu oni ankaŭ rajtas uzi infinitivon antaŭ aliaj prepozicioj? Ekzemple: *antaŭ manĝi, antaŭ paroli, antaŭ vojaĝi; post dormi, post bati, post manĝi; kanti kun danci, manĝi kun trinki, ridi kun plori?*



Francisco S. Wechsler

Respondo

Ĉi tiun punkton pritraktis Zamenhof en 1908 per tri el siaj *Lingvaj Respondoj*:

[...] en Esperanto oni uzas la infinitivon nur aŭ en formo de rekta komplemento (ekzemple “mi **amas danci**”), aŭ en formo de nereka komplemento kun la prepozicioj “por”, “antaŭ (ol)”, “anstataŭ”, kaj ke en ĉiuj okazoj, kiam oni bezonas uzi la infinitivon kun iu alia prepozicio, oni devas uzi anstataŭ ĝi partupon aŭ substantivon kun prepozicio (ekzemple: “li foriris, ne **premite** lian manon” aŭ

“**sen premado** de lia mano” anstataŭ “**sen premi** lian manon”). [...]

Efektive, tiu ĉi respondo — fakte aprobo al aserto de konsultinto — estas nekompleta, ĉar la infinitivon oni ankaŭ povas uzi kiel subjekton, kiel ekzemple en *Morti pro la patrujo* estas agrable. (Ekzercaro §20)

[...] la esprimojn “li faris ĉion **sen ridi**” aŭ “li restis du tagojn **sen manĝi**” mi ne konsilus al vi uzi. Prepozicion antaŭ verbo mi konsilus uzi nur en okazo de neceseco, se alie ni ne povas bone esprimi nian personon. Sed anstataŭ “**sen ridi**” aŭ “**sen manĝi**” ni

povas ja tre bone diri **“sen rido”**, **“sen manĝo”** aŭ **“neniom ridante”**, **“nenion manĝante”**.

Ĉiu prepozicio, laŭ sia logika esenco, povas esti uzata nur antaŭ substantivo. Sekve se antaŭ vorto, kiu havas verban sencon, ni deziras uzi prepozicion, ni devas doni al tiu verbo senca vorto la formon de substantivo; ekzemple: anstataŭ **“kun saluti”**, **“sen respondi”** ni devas diri **“kun saluto”**, **“sen respondo”**. Se la vortoj **“por”** kaj **“anstataŭ”** estas uzataj kun la infinitivo, ili tute ne prezentas ian escepton, sed la kaŭzo de tia uzado estas alia, nome: la vortoj **“por”** kaj **“anstataŭ”**, uzataj antaŭ infinitivo, havas la sencon ne de pura prepozicio, sed preskaŭ de konjunkcio, kaj en tiuj okazoj la uzado de substantivo apud ili estas ne ebla; ekzemple, en la frazo **“anstataŭ stari li sidas”** ni ne povas anstataŭigi la formon **“stari”** per **“staro”**, dum ĉe ĉiu alia prepozicio pura ni ĉiam povas uzi la verbosencan vorton en formo de substantivo (ekzemple, **“sen ia diro”** anstataŭ **“sen ion diri”**).

Tamen Zamenhof ankaŭ iafoje uzis la prepozicion **“krom”** antaŭ infinitivo, supozeble kun la sama pravigo. Jen tri ekzemploj:

Vi nenion povas fari **krom** kunbati viajn dentojn [...] (La Rabistoj, 1908)

Sed kion alian ili ankoraŭ povoscias **krom danci**, tordi la piedojn kaj fari turnoventon? (Fabeloj de Andersen, 1916)

Ne ekzistas alia bono por la homo, **krom manĝi** kaj trinki kaj igi sian animon ĝui plezuron de lia laborado; [...] (Malnova Testamento, 1916)

Li ankaŭ dufoje uzis la prepozicion **“sen”** antaŭ infinitivo, sed en teksto publikigita nur kvar jarojn post la *Unua Libro*, kiam certaj gramatikaj doktrinoj ankoraŭ ne firmiĝis:

[...] la timo, ke li ne povas subskribi per sia nomo dokumenton, [...], **sen elmeti sin al ia ankoraŭ ne konata danĝero aŭ devontigi sin sen scio al pagado de grandegaj sumoj**; [...] (La Batalo de l' Vivo, 1891)

[...] mondo, super kiu la suno neniam leviĝas **sen rigardi** milojn da sensangaj bataloj, [...] (same)

Malgraŭ la opinio de Zamenhof, la uzado de **“sen”** sekvata de infinitivo iom post iom disvastiĝis, kaj estas renkontebla ĉe multaj aliaj aŭtoroj:

La knabo sonorigis, revenis en la domon **sen diri** eĉ unu vorton, (Kabe, Fratoj Grimm – Elektitaj Fabeloj, 1905)

Tie li tutan tagon restis **sen manĝi**. (Le Monde diplomatique en Esperanto, 2008–2010)

[...] subite ŝi ne povas imagi lin **sen** **vidi** liajn manojn plenaj de sango. (Stelan Engholm, *Vivo Vokas*, 1946)

[...] kiam oni batalas dum jaroj kontraŭ malsukceso **sen** **vidi** elirvojon. (Cezaro Rosseti, *Kredu min, sinjorino!*, 1949)

Oni povas [...] esprimi ĉion sentatan, **sen** **timi** la alfrontiĝon kun rigardo, [...] (Claude Piron, *Ĉu rakonti novele?*, 1986)

[...] **sen** **zorgi** pri la disflugintaj folioj li amare kaj mallaŭte esploris. (Pokrovskij, *La Majstro kaj Margarita*, 1991)

[...] oni ne povas piediri tra la urbo **sen** trovi kelkajn el tiuj parkoj. (Kontakto, 2011–2019)

Por esprimi tempkomparon, Zamenhof uzis interalie la konjunkciecan “antaŭ ol”, i.afoje sekvatan de infinitivo:

Sed **antaŭ ol** viziti lin, vi faros / prudente, se vi bone eldemandos / Pri la konduto lia. (*Hamleto*, 1893)

[...] estas dezirinde, ke ĉiu, **antaŭ ol** komenci la legadon de la esperanta literaturo, tralegu atente la Fundamentan Krestomation. (*Fundamenta Krestomatio*, 1905)

Oni devas iri longan distancon, **antaŭ ol** veni al la rivero, [...] (Fabeloj de Andersen 1, 1909)

[...] ili tradormis tie la nokton, **antaŭ ol** transiri. (*Malnova Testamento*, 1916)

Oni povus atendi, ke, paralele al “antaŭ ol”, li ankaŭ uzus “post ol”, sed tio ne okazis, egale ĉu kun aŭ sen infinitivo. Simila neparaleleco ekzistas inter “post kiam” kaj “antaŭ kiam”, ĉar Zamenhof neniam uzis la ĉi-lastan. Rezulte, “antaŭ kiam” kaj “post ol”, kvankam teorie ĝustaj, ankoraŭ ne enradikiĝis, malgraŭ ilia uzado fare de kelkaj aŭtoroj. Krome, “antaŭ kiam” aŭ “post kiam” sekvataj de infinitivo estas rigardataj kiel eraraj; kaj “post ol” sekvata de infinitivo estas malofta:

Post ol fari intervjuon ĉe radio kaj ĵurnaloj, li formulis tre ekvilibran leteron al la konferenca prezidanto, [...] (*Revuo Esperanto*, 1988, p.24) (Pli kutimaj estus la jenaj konstruoj: **post kiam** li faris intervjuon...; **farinte** intervjuon...)

La neparalelecon inter “antaŭ ol” kaj “post ol” jam en 1914 komentariis Emile Boirac, tiama prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Akademio. Li raportis, ke Zamenhof, konsultite de li pri “post ol”, ĝin “plene aprobis” (*Oficiala Gazeto*, 1914, p. 156).

Rilate la uzadon de aliaj prepozicioj aŭ konjunkcioj antaŭ infinitivo, Bertilo Wennergren asertas: *La Esperanta tradicio estas malfacile klarigebla per logikaj argumentoj. Esence ĝi estas arbitra tabuo. [...] Pli-malpli ekde la jaro 2000 oni povas rimarki tendencon rompi tiun tabuon, precipe ĉe junaj Esperantoparolantoj.* (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, 2022)

Resume: se oni intencas verki strikte respektante la stilon de

Zamenhof, oni uzu infinitivon sole nur post “antaŭ ol”, “anstataŭ”, “por” kaj “krom”. Se sekvi lian aprobon de “post ol”, oni rajtas ankaŭ uzi ĉi tiun formon. Iom pli elaste, oni povas uzi ankaŭ “sen” sekvatan de infinitivo, ĉar tia konstruo estas plene komprenebla kaj nuntempe sufiĉe vaste uzata. La plej aŭdacaj emos eksperimenti per aliaj prepozicioj sekvataj de infinitivo, sed, ĉar tiaj konstruoj estas ankoraŭ nekutimaj, oni riskos nekomprenon aŭ malakcepton.



Daŭrigo de la paĝo 23 (Por via medito / Senco de la vivo)

venontaĵo, restas la funda percepto pri nia vera kosma kaj spirita dimensio. Sekve eksencas la versiklo Agoj 17:28, kiu nin memorigas, ke ni estas Fontosparkoj, sparkoj de Kreinto, “*ĉar en ĝi ni vivas, kaj moviĝas, kaj ekzistas*”. Tio signifas diri, ke nenio ekzistas ekster Dio, ekster Absoluto. Ni vivas

dum la tuta tempo mergiĝintaj en Plena Malpleno, en senfina Spaco, senfina Vivo, Natura kaj Universala Saĝeco. Simile al la sparkoj kiuj ni estas de Supera Estulo, kiu estas! Kaj tiel estas.

Paulo Nascentes

Virtuala kongreso de ILEI

Ĝus finiĝis VEKI-3 (Virtuala E-Kongreso de ILEI). En 2020, pro la pandemio, kiel alternativo al la ILEI-kongresoj, ekestis VEKI, kies nomon Stefan MacGill proponis al la virtuala kongreso, ĉu por vek_i la esperantistojn pri la ekzisto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), ĉu por vek_i la esperantistajn instruistojn pri la okazigo de ĉiujara evento, kiu pritaktas edukadon tutmonde kaj instruadon de Esperanto kaj de aliaj lingvoj.

La temo de VEKI-3, kiu okazis de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2022 estis “Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado”.

Pli ol 300 esperantistoj, el 58 landoj aliĝis kaj dum 8 tagoj diskutrondoj, prelegoj kaj koncertoj allogis la homojn partopreni per Zoom aŭ spekti la programojn per la jutuba kanalo de UEA, kie nun troviĝas 10 videoj kun la tuta VEKI-3, escepte de la koncertoj (www.youtube.com/user/UEAviva).



Mi ne listigos ĉi tie ĉiujn prelegojn, sed nur kelkajn. Plena programo troviĝas en la retejo de la kongreso, kaj en la priskriboj de ĉiuj videoj oni povas legi la programojn de la koncernaj tagoj.

Multaj altnivelaj prelegoj atendas vin, kiu maltrafis la kongreson. Inter ili troviĝas: “La 30 oraj horoj kaj instruado de Esperanto en lernejoj” fare de Bruĉjo Kasini el Italio. Se vi emas fari similan projekton en via urbo/lando, li anoncis la pretecon helpi vin. (www.30oredoro.it)

La redaktoroj de la revuo Esperanto, Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

prelegis pri “Esperanto-kursoj en universitato kaj jutubaj intervuoj”.

François Lo Jacomo parolis pri “La lerneja eksperimento de Helmut Sonnabend”. Pliajn detalojn de tiu propedeŭtika eksperimento vi trovos en la libro “Esperanto: lerneja eksperimento”.

La prezidanto de UEA, Duncan Charters prelegis pri kelkaj temoj: “Kion oni instruu pri kulturo en klasoj de Esperanto?”; pri “Interkultura kompetento – kio ĝi estas kaj kion ĝi celas?”; kaj pri “Kial legi literaturon, kaj literaturon en Esperanto?”.

Mi mem prelegis pri “Virtualaj Esperanto-kursoj per Google Classroom” la 26-an de julio, kiam mi iom lernigis uzi la platformon por instrui la lingvon.

Laura Brazzabeni el Italio pri “Dulingva edukado kaj enmigrado”; Amri Wandel el Israelo pri “Denaska multlingva edukado”; Reza Kheirkhah pri “Mia fleksebla kaj kelklingva metodo de instruado”; kaj Ankica Jagnjić prelegis pri “Spertoj en edukado de denaskuloj”.

Kadre de VEKI okazis AMO-Seminario, kies ĉeforganizanto estas Stefan MacGill. Li mem pritraktis la temon: “La landa agado de UEA kaj

ILEI”. Mireille Grosjean, eksprezidanto de ILEI, parolis pri la “Juvelo” de la ligo, la revuo JUNA AMIKO”. Ŝi ankaŭ raportis pri “la Ekzamenoj KER kaj ILEI-UEA” kaj pri “la Laboro de Scio Sen Bariloj. Sukcesa kurso en Benino”; Fine, Guglielmo Martelli pri “la Vasta Lerneja Projekto, kiu proponas Esperanton por faciligi la trejnadon kaj dungadon de teknikistoj kaj vendistoj de enpakigaj maŝinoj”.

La du lastaj tagoj de ILEI-kongresoj estas dediĉitaj al Simpozio, kiu ĉi-jare havis kiel Ĉefprelegon: “Esperanto: valora instrumento por ‘lingva higieno’” fare de Prof. Fabrizio Angelo Pennacchietti el Torino.

La Simpozio enhavis prelegserion de 13 universitataj profesoroj. Inter ili Alessandra Madella (Zaozhuang-Universitato) pri “Lev Vygostsky kaj dulingva edukado”; Olta Totoni (Lancaster University, UK) pri “Constructed Languages in Translation: A. Burgess’s Nadsat in A Clockwork Orange”; Giridhar RAO (Universitato Azim Premji, Bengaluro) pri “La angla kaj la gepatralingva edukado en Barato”; Michele Gazzola (Universitato de Ulstero, Britio) pri “La aliro de Eŭropa Unio al plurlingveca komunikado”; Fernando Pita (Universitato de Rio-de-Janeiro) pri “Kia Pedagogio por ni,

esperantistoj el la Tria Mondo?"; Du Xin pri "La sukceso de ĉina tradicia kulturo inter animaciaj fervoruloj en Japanio"; Ilona Koutny, (Universitato Adam Mickiewicz, Poznań/PL) pri "Esperanto kaj la angla por interkultura komunikado kadre de la nova magistra programo pri interlingvistiko en AMU"; Jeremie Sabiyumva (el Burundo) pri "Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado: la kazo de Afriko"; Vicente Manzano-Arrondo (Universitato de Seviljo) pri "Defioj en klasĉambroj kun kultura diverseco"; Katalin Kováts (edukado.net) pri "Kunhavigado de spertoj" Instruu kaj ekzercigu tutmonde" kaj Ivan Eidt Colling (Federaĵo de Universitato de Paranao/BR) pri "Similaĵoj kaj malsimilaĵoj inter la fonemsistemoj de la portugala lingvo kaj de Esperanto kaj observoj pri la sonproduktado farita de lernantoj".

Interesaj diskutrondoj okazis. Inter aliaj, Didier Janot el Francio pri "Kiel allogi novajn, junajn instruistojn al ILEI?" kaj aliaj pri UNESKO kaj pri ILEI-sekcioj.

Ni havis koncertojn de "Sepa kaj Asorti", "Chiara Raggi", "Clarissa Sabatini", "Piero Nissim", "Anjo Amika" kaj "Ĵomart kaj Natasha".



Aristophio Alves Filho estas la nuna gvidanto de la Brazila Sekcio de ILEI

Venontjare, la 56-a ILEI-kongreso devas okazi en la itala urbo Lignano Sabbiadoro (Linjano Orsabla). (https://eventaservo.org/e/ILEI_56)

En 2023 Italio estos "la lando de Esperanto", ĉar tie okazos la 108-a Universala Kongreso, la 56-a ILEI-kongreso kaj 79-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO.

www.espero.ir/eo/veki-3/
(Retejo de VEKI-3)

Aristophio Alves Filho

Manifesto

DANIEL MUNDURUKU estas konata brazila verkisto, kun abunda produktado de libroj pri la indiana kulturo. Li naskiĝis en indiana popolo Munduruku, en la norda ŝtato Pará, kaj fariĝis antropologo, filozofo kaj edukisto. Li ofte partoprenas en pluraj konferencoj kaj kursoj por infanoj, ankaŭ en Eŭropo. Li ricevis multajn premiojn kaj kandidatiĝis al vako en la Brazila Akademio de Beletro.



En majo 2022 li lanĉis broŝureton “Mia Sovaĝula Utopio” (UK’A editorial), kiu enhavas plurajn artikolojn esprimantajn liajn vidpunktojn pri nia mondo. Mi kontaktis lin persone, kaj petis permeson por publikigi Esperantan version de la ĉi-suba “Manifesto”. Li afable konsentis. Ni kore dankas.

MANIFESTO

Daniel Munduruku

Mi naskiĝis en socio, kie homoj estas edukataj por senti sin parto de tuto;

En kiu tempo ne estas io linieca, kio malebligas, ke homoj malŝparu sian vivon kurante post riĉaĵoj kaj potenco;

En kiu ĉiun vivofazon oni pritraktas kiel proceson, kiu neniam plu ripetiĝos, kaj tial oni ĝin travivu plene;

En kiu la rilatoj kun la naturo ne estas por regado, sed por kunvivado;

En kiu la homoj sentas sin solidaraj unuj al aliaj, kaj kapablaj kundividi sian panon kaj sian poezion;

En kiu pasintecon oni rigardas kaj respektas kiel memoron, kaj estantecon kiel donitaĵon, kiun oni devas ĝui kaj danki, ĉiumomente;

En kiu infanoj povas ĉion, ĉar ilin edukis maljunuloj, kiuj ĉion scias;

En kiu scioj estas kundividataj per historioj rakontataj dum senlunaj vesperoj, por ke ili memorigu nin, ke ni estas partoj de la mondo, ne posedantoj de ĝi;

En kiu, fine, NI ESTAS, de la naskiĝo, kaj ni naskiĝas por esti tutecaj, kompletaj, ne en fora estonteco, sed nun, en la nuna tempo, hodiaŭ...

Mi komprenas, ke estas necese valorigi ĉiajn sciojn;

Veki ĉiun talenton;

Nutri ĉiun revon;

Kaj revu, revu, revadi.

Revu eblan revon pri toleremo, respektemo, digno, rajtoj.

Revu pri mondo, kiu faru nin digna akcepti tion, kio ĉiu estulo estas.

Revu pri ia realo, kiu konsistas el ĝojo, nutrata per la libereco esti kaj vivi sen konkurado por montri meriton super alia homo.

Ha, kian deziron mi havas pri konstruo de ia realo, en kiu ni povu efektive esti pliaj, ĉar ni estas Unu!

Iu eble diros, ke tio estas utopiaĵo. Li diros bone, li diros ĝuste. Ĝi estas.

Plej ĝojige estas scii, ke ĝi eblas. Mi travivis tion. Mi venis el tie.

Jen kion mi volas proponi ĉi tie. Tia estas la bona vivo, kiun mi lernis de mia gento. Ĉeesti. Aparteni. Konscii pri mia loko. Kompromisiĝi kun mia realo. Ne resti indiferenta. Ne akcepti, ke iu diras al mi, ke mi ne rajtas fari. Esti libera. Kompreni, ke mia memrealiĝo estas ebla nur kiam ankaŭ aliulo realiĝas. Esti solidara, servopreta kaj kolektivema.

Fine, ESTI.

(Esperantigis **PSV**)

